NIA PONTO

Grupo Esperantista	E-kursoj: Vendrede
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre	Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
E-48005-BILBAO (Hispanio)	Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato
☎: 94.416.44.92	Eliro al "Nova Placo": 1-a dimanĉo de ĉiu monato
💻: tepgaitj@lg.ehu.es aŭ esperantobilbo@lettera.net	
Jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj	**BBK-konto: 22-1800155-0**

MAJO/JUNIO 1.999

NO LO OLVIDES: SABADO 26 DE JUNIO. 19,30 h.

kurs-fina festo.

Jam tradicia, ĝi okazos la **sabaton 26-an de Junio** , **ekde la 7,30 h**., ĉe nia sidejo. Kiel kutime, ĉiu partoprenant(in)o devos alporti ion manĝeblan,dum la Grupo disponos la panon kaj la trinkaĵojn.

Ni atendas vin ĉiujn, viajn geamikojn kaj kiun ajn gesimpatianton de la Internacia Lingvo por ĝui Esperantan etoson kaj renkonti malnovajn gekonatulojn.

NE FORGESU: SABATON 26-an de JUNIO. 19,30 h.

Lastaj informoj pri la Hispana Kongreso (Castellón, 17/21 Julio 1999)

1. Finfine prezentiĝos en la kongreso la tre konata kaj prestiĝa Bulgara Esperanto-Teatro (BET), kiu prezentos tri teatraĵojn.
2. La urboj aŭtoritatuloj donacos, al ĉiu kongresano, senpagajn enirbiletojn por la urbaj busoj. Speciale gravas por tiuj "sunbruliĝemuloj", kiuj ĉiutage deziros iri el la kongresejo (Universitato) al la plaĝo.
3. Jam konfirmiĝis la kuirado de giganta "paelo" por 500 homoj, kompreneble, tute senpaga por la kongresanaro. Ĝi estos kuirata liberaere, la dimanĉon 18-an, ĉe la plaĝo.

(rap. A. Casquero)



ĈLOSILO AL 76 LANDOJ

Probable la plej populara publikaĵo de **Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo,** la listo de esperantistaj gastigantoj **Pasporta Servo** aperadas ekde 1974. La freŝa, 174-paĝa kajero **Pasporta Servo 1999** enhavas 945 adresojn -74 pli ol pasintjare- en 76 landoj.

INFORMO PRI LA ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Kiel anoncite, la pasintan vendredon 30-an de Aprilo, okazis la ĉiujara ĝenerala kunveno de la sociaro de nia Grupo. Ĝin partoprenis 14 homoj kaj, krom aprobo de la konto-stato kaj de la buĝet-propono por la nuna jaro (ambaŭ prezentitaj en la antaŭa cirkulero), oni nomumis novan estraron. Jen ĝi:

Prezidantino: Igone Manciles Marín
Vic-Precidanto: Santiago Martín Relea
Sekretario: David Redondo Rodríguez
Kasisto:
Voĉdonantoj: Carlos Barrio Pérez
José Pérez-Salado Kamps

Estas du aferoj rimarkindaj:

1. Unuafoje en la jam preskaŭ centjara historio de nia Asocio, virino akceptis esti prezidantino. Juna kaj entuziasma, ŝi gvidos la eniron de la Grupo en la 21-a jarcento.
2. Neniu deziris preni sur sin la respondeco esti la nova kasisto. Pro tio, la antaŭa, Jesús García Iturrioz, daŭrigos ĝis apero de volontul(in)o.

Peto de raporto far de internacia revuo.

Post apero en *Boletín* de HEF de raporto pri montoekskurso al Galdames kaj rearbarigo de deklivo ĉirkaŭ Bilbao, respondeculo de TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) petis al redaktoro de *Boletín*, Miguel Gutiérrez Adúriz, ke li peru por ke ni skribu pli ampleksan raporton pri tiu arbarigado, cele al publikigo en *La Domo*, oficiala organa de tiu Asocio. Nia samideano David Redondo okupiĝos pri la afero.

Mallonge.

Nacia kaj Universala kongresoj jam alproksimiĝas; ne dubu kaj demandu en la grupejo pri vojaĝeblecoj; kelkaj el niaj plej junaj membroj jam cerbumas pri tio laŭ ne tro kostaj kondiĉoj.

Ĝis la 25-an de aprilo al la Berlina Universala Kongreso (31 jul.- 7 aŭg. 1999) aliĝis 2.250 personoj el 55 landoj.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA de UEA ricevis 419 korespondpetojn en 1998 el 53 landoj. Plej multaj estis senditaj el Francio (70), Brazilo (59), Ruslando (38), Irano (22), Kubo (21), Madagaskaro (19), Pollando (13).....

En **Interneto** vi trovos korespondpetojn ĉe: **http://www.esperanto.se** kaj **http://members.aol.com/enrike/ekspeto.htm.**

Kunveno pri la situacio de la E-instruado.

Dum la Hispana Kongreso oni intencas okazigi kunvenon por pritrakti la nunan situacion de la E-instruado en Hispanio kaj la eblecon kunlabori kun ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), plejĉefe kun ĝia respondeculo en Hispanio, Sro. Martín Burutxaga; li plendas, prave, ke fakte nur en Katalunio estas aktivaj membroj de ILEI.

Ĉiu interesito pri la afero povas kontakti, rete, Sron. Casquero, el Valencio (a-casquero@redestb.es). Aliĝo al ILEI kostas nur 22 guldenojn (ĉ. 1800 ptojn.) kaj ĉiu membro ricevas la interesan bultenon "Pedagogia Revuo".

Interalie, en Valencio oni pristudos la eblecon okazigi kursojn de Esperanto en oficialaj lernejoj, profitante la ĉi-jarajn spertojn de Blanes (Martín Burutxaga), Valencia (Casquero), Tarragona (Marimón), La Laguna (Alejandro López Vergara), Murcia (de las Heras), ktp.

Dum la kongreso, ankaŭ estos ekzamen-sesio de ILEI por tiuj, kiuj interesiĝos pri ricevo de UEA-diplomo. Profesoro Anton Zacharias (Slovakio) helpos por finpretigi la ekzamenotoj.

(rap. A. Casquero, HEF-estrarano pri Edukado)

Kurso de Esperanto en la Valencia Universitato.

Dum la nuna lernojaro, 1998/99, okazis denove, jam por la kvara jaro, kurso de Esperanto en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Valencio (Hispanio).

Samkiel dum la antaŭaj tri jaroj, la problemo estis la geestudenta amaso, kiu celis partoprenon. Oni devis disdividi la gelernantojn en du grupoj; entute partoprenis, kaj ricevis universitat-diplomon, 93 homoj.

Tiu diplomo havas oficialan akademian valoron je tri kreditoj de "libervola elektita" studobjekto, kaj aperos ene de la "curriculum" samvalore ol iu ajn alia studobjekto.

Aliĝis ne nur gestudentoj de la Filologia, sed ankaŭ de aliaj Fakultatoj, kun la sola kondiĉo ke ili apartenu al la Valencia Universitato. La instruisto estis Aŭgusto Casquero kaj la kurs-direktorino Berta Raposo.

En la oficiala fermo, kiel honoraj gastoj, prelegis Gian Carlo Fighiera (Italio), pri "Praktika uzo de Esperanto", kaj Jorge Camacho (Hispanio/Belgio), pri "Verki en du lingvoj samtempe: hispana kaj esperanta". (Rap. A. Casquero)

Monto-Ekskursoj.

La E-Grupo de Bilbao organizas diversajn monto-ekskursojn cele al uzado de la Internacia Lingvo for de la Klas-muroj. La provizora programo estas jena:

26 Septembro. Eliro: 9 h. el Teatro Arriaga (Bilbao) aŭ 10 h. el Etxaguen (Alava). Ekskurso al monto Oketa (Alava), 1.031 m.

17 oktobro. Eliro: 9 h. el Teatro Arriaga (Bilbao) aŭ 10 h. el Urbodomo de Azkoitia (Guipuzcoa). Ekskurso al monto Erlo, 1.026 m.

14 Novembro. Eliro: 9 h. el Teatro Arriaga (Bilbao) aŭ 10,30 h. el Dobro (Burgos). Ekskurso al Peña Alta de Dobro, 1.267 m.

12 Decembro. Eliro: 9 h. el Teatro Arriaga (Bilbao) aŭ 10,30 h. el Landeral (Cantabria). Ekskurso al Pico de las Nieves, 779 m.

Ĉiuj estos tuttagaj ekskursoj kaj okazos malgraŭ eventuala aĉa vetero; geesperantistoj el najbaraj regionoj estos varme akceptataj.

Novaĵetoj el "Boletín" de HEF.

1. La 19-an de marto, la kongresa fako de UEA registris jam **2.000 aliĝintojn** al la 84a UK (31 jul./7 aŭg. 1999). Plej multnombras tiuj de Germanio (418), Francio (232), Polio (162), Japanio (149), Nederio (83), Svedio (77), Italio (74), Litovio (64), ...

2. Se vi retumas, povas antaŭscii la **veteron** en via urbo danke al entrepreno Wunderground, kiu ofertas E-version de siaj veter-prognozoj en la adreso http://esperanto.wunderground.com.

3. Ĝis la 15a de Decembro 1998, **131 Eŭroparlamentanoj** (20,92%) opinias ke Esperanto povus iel helpi por solvi la lingvan problemaron en Eŭropa Unio. El Hispanio estas nur 10 (3 el PP, 4 el PSOE, 2 el CDC kaj 1 el PNV).

4. **"Fundación Esperanto"** (fundacion@esperanto.nu) dediĉos ĉijare 300.000 ptojn por aktivaĵoj de la diversaj grupoj; oni sendos cirkuleron por informi pri la kondiĉojn por atingi monhelpojn.

5. La estraro de HEF decidis akiri 400 ekzemplerojn de la **poŝvortaro** "Lexicón Sopena" por favori la grupojn, tiel ke ili povos ricevi de la CO de HEF la vortaron je pli malalta prezo ol se ili rekte mendus ĝin ĉe la eldonejo (min. 10 ekz.).